



À Saveurs d'Exil, on s'organise bénévolement afin de lutter contre différentes formes d'exclusion et de précarité.

Notre objectif est de créer un cadre de soutien collectif des bénévoles face à des situations souvent difficiles et marginalisantes.

On partage nos connaissances, nos savoirs faire, et on vous propose de les découvrir lors de nos événements.



saveursdexil.wixsite.com



**ESPERANTO
FESTO**

La fête de l'espéranto 2021

esperanto
toulouse

5-an de decembro 2021

*Salle des Fêtes de Lafourquette
28 Rue de Gironis Tuluzo*

*organizita de Esperanto-Kultur-Centro
toulouse.occeo.net/*

Programo

10h00 : Kunsido de regionaj asocioj kaj aktivuloj

12h00 : Akceptado

12h30 : Manĝo vegetarana proponita de Saveurs d'exil

14h00 : Diversaj anoncoj

15h00 : Kultura programo:

- La filipina lingvo: : krizo pri identeco? Kurioza produkto de kolonia memoro, **Albert Stalin Garrido**, vic-prezidanto de TEJO
- Prezento de niaj projektoj Erasmus+
- «Estas nenio plu», teksto de Léo Ferré, deklamita de Arno kun muzika akompano de JoMo

17h00 : Koncerto: La grupo **Vojaĝo** prezentos sian novan albumon !

Tuttago : Asocia foireto, libroservo, diskoservo, ekspozicioj

La filipina lingvo

Albert Stalin Garrido, vic-prezidanto de TEJO kaj prezidanto de Filipina Esperanto-Junularo parolos pri " La filipina lingvo: krizo pri identeco? Kurioza produkto de kolonia memoro"

La filipina lingvo, oficiale la nacia lingvo de Filipinoj, havas kuriozan elementon: ĝi estas konfuza mikso de pluraj lingvoj, lokaj kaj fremdaj. Kiel tio efikas sur ĝiajn parolantojn? Ĉu vi povos kompreni kelkajn frazojn? Rigardu la kuriozan lingvopolitikon en Filipinoj, mem spuron de jarcentoj de koloniaj radikoj.




«estas nenio plu»

teksto de Léo Ferré,

deklamita de Arno kun muzika akompano de JoMo

En la dudek lastaj jaroj de lia kantista kariero, Léo Ferré (1916-1993) preskaŭ ĉiufoje finis siajn koncertojn kun tiu teksto «il n'y a plus rien» (estas nenio plu) kiu estas kvazaŭ lia filozofia testamento. Tiu teksto eldonita en 1972 inspiriĝas de lia sperto de la revolucia movado de la jaro 1968-a en diversaj lokoj en la mondo (Parizo, Milano, San Francisko, Meksiko), kiu vekis grandajn esperojn sed estigis same grandan elreviĝon. Tiu movado estis malfrua reeĥo de la Franca Revolucio de 1789 kaj de ties aliaj reeĥoj (1830, 1848, la Pariza Komunumo 1871, la Rusa Revolucio 1917, la Hispana enlanda milito 1936, ktp.) kion prialudas la vortoj «de ducent jaroj vi akiras biletojn por la revolucioj, ...».





De 2017, Esperanto-Kultur-Centro partoprenas en pluraj eŭropaj projektoj kadre de la programo Erasmus+

Trejnu la trejniston, moviĝoj, Reta Edukado Nun, partneroj, volontulado por daŭripovaj organizoj, plifortigo de kapabloj, KA1, KA2, kandidatiĝoj, akreditiĝo...

Jen titoloj, terminoj aŭ sigloj kiuj povas aspekti iom nebulaj al nespertuloj, ni klarigos al vi la celojn, oportunojn kaj rezultojn de tiuj projektoj por EKC kaj pli ĝenerale por esperantujo.

Prezentos **Marion QUENUT** kaj **Michael Boris MANDIROLA**



Vojaĝo



Vojaĝo estas la historio pri la amikeco inter ses muzikistoj de Tuluzo. Kunigitaj de komuna pasio por latina muziko kaj ĵazo, ĉi tiuj "vojaĝantoj de la Sudo" forĝas komponojn kun la spontaneco, entuziasmo, kaj varmo de la Sudo. La bandon Vojaĝo karakterizas ankaŭ la deziro meti arton al la servo de ĝustaj kaŭzoj, kiel la respekto de la medio kaj amikeco inter homoj dank' al Esperanto.

Foje ĝoja kaj jubilanta, la muziko distilita de Vojaĝo malkaŝas la ĝojon de la muzikistoj, feliĉaj dividi sian pasion. Unu el la karakterizaĵoj de Vojaĝo estas la gusto por melodioj faritaj "a la mano" per veraj instrumentoj kiuj vibras, resonas, spiras, kaj donas sian animon al la muziko. Knedi la sonan paston en ĉizelitan, ameformitan muzikon, laŭ la maniero de la plej spertaj metiistoj.

Per sinkopitaj ritmoj, prenante siajn radikojn de Choro, Bossa Nova, Samba, Salsa, aŭ Blusoj, la stilo de **Vojaĝo** havas akcentojn forte orientitajn je la Sudo, de Brazilo, Karibio, Italio, Argentino, aŭ Luiziano, kiuj enŝipigas vin sur vojaĝo al la alia fino de la Tero, en la antaŭurboj de Rio, São Paulo, aŭ Belem, Kubo, Buenos Aires, Napolo, aŭ Tuluzo.

Vojaĝo prezentiĝis en koncerto por la unua fojo antaŭ Esperanto-publiko dum la 100a Universala Kongreso de Esperanto ĉe la Palaco de Kongresoj en Lilo en julio 2015.

Vojaĝo estas formita de:

- **Linda Le Nepveu**: kanto, fluto .
- **Gilles Bénard**: klavaroj.
- **Jean-Claude Patalano**: kanto en esperanto, tenora kaj soprana saksofonoj, klarneto, transversa fluto.
- **Didier Kerboull**: basoj.
- **Didier Jéol** : drumoj.



Kelkajn tagojn post la eldono de la unua albumo de **Vojaĝo**, *Planedo nia*, demando alvenis el Sudameriko: **Aleksandro Kosabela** proponis kunlaboron pri la kanzonoj de sia nova albumprojekto.

Tiu demando ne estis surpriza ĉar **Jean-Claude Patalano** kaj **Ale** jam kunlaboris en 2004 pri la aranĝoj de pluraj titoloj de la albumo de **Strika Tango**, *Civilizacio*.

La venonta albumo titolita «Intergalaksia» estos nur en Esperanto. Ĝi aperos komence de la jaro 2022-a kaj entenos 14 erojn.

www.vojagxo-muziko.fr/eo/groupe-eo.html

